

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 49

Melburno (Melbourne), Aŭstralio.

10 julio 1924

TRANSLATION CIRCLE TO RECOMMENCE.

For the past ten years, with occasional suspensions, a study group for the practice of translation into Esperanto has been open to Australasian Esperantists desirous of improving their style and widening their knowledge. This group has been under the guidance of Mr. George Gordon, B.B.E.A., the well-known local authority on Esperanto and the translator of many books, dramas and short stories into the language. Owing to the many who have recently commenced the study of Esperanto, who would be benefited by twelve months' membership of the group, Mr. Gordon has been prevailed upon to supervise its activities for a further term. An English piece of five to seven hundred words is set each month to be translated, but no one is expected to translate more of it than can conveniently or painstakingly be done. The translations are perused by Mr. Gordon, who compiles a paper dealing with the weaknesses revealed by the translations sent in. Mr. Gordon also translates the set piece as a model to be compared with the students own effort and to be studied in connection with the notes supplied. Although this takes up a great deal of Mr. Gordon's time he receives no

fee whatever, but out of goodness of his heart places his knowledge and help gratuitously at the service of those anxious to improve their knowledge. He is especially anxious to have pointed out that those, who, by reason of their distance from towns or other reasons, do not belong to an Esperanto Club, have the opportunity of participating. Country and Interstate Esperantists may join by paying the small sum necessary for typewriting and by sending stamped addressed envelopes for the set piece and for the return of their translation with the conductor's translation and notes. No communication on this matter is to be made direct to Mr. Gordon. All inquiries must be made from Miss B. K. Blyth, 10 Victoria Avenue, Surrey Hills (Vic). Those desirous of joining should send her one shilling (by postal note) and two addressed foolscap envelopes each stamped with 1½d. stamps and they will receive the first set piece of the present series.

Nothing but much translation and exercise in writing Esperanto will give facility and grace in handling the language and those students who are alive to the exceptional opportunities now placed so inexpensively at their disposal are urged to take advantage of them. Any further information desired will be supplied, on application, by Miss Blyth.

FISH THAT THINK.

It has been proved by a French naturalist, as the result of a series of interesting experiments, that fish can actually reason, though very slowly.

M. Oxner baited a hook, and fastened a tiny piece of white paper about two inches above it. With this bait he tempted a recently captured fish. The fish, however, was wily, and for seven days refused the bait. Then, when the week-old memory of his capture had apparently vanished from his mind, the fish bit and was hooked. M. Oxner carefully unhooked the catch and replaced it in the water, also readjusting the bait with the warning paper. Three times more the fish bit, with a day's interval between each bite. After that it no longer touched the bait, for the meaning of the paper signal had become known to it.

On the twelfth day the piece of paper was removed from the hook and the fish bit the bait!

The paper was replaced, and for three days the fish refused to tackle the lure, contenting himself with watching it at a safe distance. On the fourth day, however, the fish swam right up to the paper signal, sniffed it, and then descended, and very cautiously nibbled the bait until it had succeeded in eating it all off the hook without swallowing the latter. On the bait being replaced, the fish did exactly the same thing, and so carefully avoided capture. Experiments with other fish had similar results.

KONGRESAJ AFEROJ.

La jenajn sumojn estas ricevitaĵoj de la sekretario s-ro R. Rawson. Donacoj:—s-ro Hepworth, 2/-; s-ro Thomas, 5/-; s-ro Serpell, 10/-; f-ino C, 2/-; f-ino Harwood, 10/6; Raciista Grupo, £2/10/-; Walking Club, 5/-.

Kongresaj biletoj:—s-ro Bagot, 21/-; H. S. Rienit, 10/6; M. Harwood, 10/6; F. T. Simon, 10/6. Al ĉiuj dankoj; Tiu ĉi tuja respondo kuraĝigas la kongresan komitaton, kiun klopodas atingi nian celon,—la plej sukcesan kongreson.

FIS'OJ POVAS REZONI.

Kiel rezulto de serio da interesaj eksperimentoj, Franca naturisto povis pruvi, ke fiŝoj efektive povas iomete rezoni.

S-ro Oxner alforksis logaĵon sur fiŝhokon, kaj du colojn super ĝi ligis peceton da blanka papero. Per tiu ĉi logilo li tentis fiŝon antaŭ ne longe kaptitan. La fiŝo tamen estis ruza, kaj sep tagojn rifuzis la logaĵon. Sed post unu semajno, ŝajne forgesinta pri la kaptiĝo, la fiŝo mordis la logaĵon, kaj surhokiĝis. S-ro Oxner zorge dekreĉis la kaptiton, kaj enmetis ĝin en la akvon, alĝustiginte samtempe la logilon kaj avertpaperon. Tri fojojn la fiŝo prenis la logaĵon kun unu taga intertempo inter ĉiu kaptiĝo. Post tiu tempo ĝi ne plu tuŝis la logaĵon ĉar la signifo de la papersignalo sciigis al ĝi.

La dekduan tagon, kiam la papero estis forigita de la hoko, la fiŝo denove mordis la logaĵon!

La papero estis remetita, kaj dum tri tagoj rifuzis akcepti la tentilon, sed kontente rigardis ĝin de sendanĝera distanco. La kvaran tagon, la fiŝo naĝis rekte al la papersignalo, ekflaris ĝin, kaj tiam malsupreniris, kaj singardeme mordetis finfine la logaĵon, lasinte nur la hokon mem. Kiam nova logaĵo vidiĝis la fiŝo same agis, kaj tiel evitis kaptiĝon. Eksperimentoj kun aliaj fiŝoj donis similajn rezultojn.

Tradukis E. S. Bigelow.

Laŭ peto de unu el niaj legantoj ni presis Anglan artikolon, kune kun la Esperanta traduko por helpi la komencantojn.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Amerika Esperantisto, n-ro 1; Esperanto Triumfonta, n-roj 188, 189, 190, 191; Export Esperantist, n-roj 3, 4; France-Esperanto, n-ro 26; Itala Esperanta Revuo, n-ro 4; Internacia Stenografisto, n-ro 7; Internacio Komercio, n-ro 11; Informservo Internacia Labora Oficejo, n-ro 58; Kristana Espero, n-ro 1—2; La Espero, n-ro 4; La Unuigita Tuthomaro, aprilo; La Suno Hispana, n-ro 83; Progress, n-ro 201; Pola Esperantisto, n-ro 1—2; Radio Servo, n-ro 1; Revuo, n-ro 4; Volker Spiegel, n-ro 7, 8.

KELKAJ C'APITROJ EL "QUATRE VINGT-TREIZE"

De Victor Hugo.
(Daŭrigo).

VI

DU PLATOJ DE PESILO.

La homo venkis, sed oni povas diri, ke ankaŭ la kanono venkis. La baldaŭan subakviĝon oni evitis, sed la korveto ne estis sen danĝero. La difektado de l' ŝipo ŝajnis neriparebla. La ŝipbordaĵo havis kvin breĉojn, el kiuj unu tre granda en la antaŭo; dudek kanonoj el trideko kuŝis difektitaj. La kanono rekaptita kaj religita al la ĉeno estis ankaŭ ne-taŭga; la fraŭbo de la posttimpivoto estis perfortita, kaj sekve la celigo neebla. La baterio estis malgrandigita je naŭ pafilejoj. En la holdo versiĝis akvo. Necese estis tuj alkuri al averioj kaj funkciigi la pumpilojn.

La interferdeko, nun kiam oni povis ĝin rigardi, estis vidotimiga. La internaĵo de kaĝo de furioza elefanto ne estas tiel ruinigita.

Malgraŭ la bezono eviti la surprizon de la korveto, estis ankoraŭ pli urĝa tasko, la tuja sinsavo. Oni devis heligi la ferdekon per kelkaj lanternoj displantitaj en la bordaĵo.

Tamen, dum la longa daŭro de tiu tragedia akcidento, la ŝipanaro absorbata de afero de vivo aŭ morto apenaŭ sciis, kio okazis ekster la korveto. La nebulo densiĝis; la vetero ŝanĝiĝis; la vento direktis la ŝipon laŭ sia volo; oni veturis ekster-voje, antaŭ Jersey kaj Guernessey, pli sude ol oni devus esti, oni troviĝis meze de malkvietiĝinta maro. Grandaj marondoj venis kisi la malfermitajn vundojn de la korveto, timiganta kisado. La balancado de l' maro estis minacanta. La marveneto fariĝis norda ventego. Stormo, eble, prepariĝis. Oni vidis nenion kvar ondojn antaŭ si.

Dum la veturantoj riparis rapide kaj neperfekte la ruinojn de la interferdeko, ŝtopis la akvoŝluojn kaj

pretigis por funkciado la kanonojn ŝparitajn de la malfeliĉo, la maljuna pasaĝero supreniris denove la ferdekon.

Li staris sin apoganta al la granda masto.

Li ne atentis pri movo okazanta sur la ŝipo. Kaviliro La Vieuville batalvicigis ambaŭflanke de la granda masto la soldatojn de marista infanterio, kaj je fajfilblovo de la estro, la maristoj okupataj en siaj taskoj stare rigidiĝis sur la jardoj.

Grafo de Boisberthelot antaŭpaŝis al la pasaĝero.

Post la kapitano marŝis viro mala-fabla, spireganta, vestoj en malordo, la mieno tamen kontenta.

Li estis la kanonisto, kiu ĵus montriĝis tiel ĝusta dresisto de monstroj, kaj kiu kvietigis la kanonon.

La grafo faris al la civilvestita maljunulo militistan saluton kaj diris:

—Mia generalo, jen la viro.

La kanonisto staris, kun okuloj mallevitaj, kun laŭordona teniĝo.

Grafo de Boisberthelot reparolis:

—Mia generalo; antaŭ la faro de tiu ĉi homo, ĉu vi ne pensas, ke por liaj ĉefoj estas io farota?

—Mi tiel pensas,—diris la maljunulo.

Bonvolu doni ordonojn,—respondis Boisberthelot.

—Vi devas ilin doni. Vi estas la kapitano.

—Sed vi estas la generalo,—aldonis Boisberthelot.

La maljunulo rigardis la kanoniston.

—Alproksimiĝu,—li diris.

La kanonisto alpaŝis.

La maljunulo turnis sin al grafo de Boisberthelot, deprenis de la kapitano la krucon de Sankta Ludoviko kaj alpendis ĝin al la bluzo de la kanonisto.

—Hurra!—vokis la maristoj.

La maristaj soldatoj prezentis la armilojn.

Kaj la maljuna pasaĝero, fingromontrante la fierantan kanoniston,

HALL'S BOOK STORE

'Phone : Windsor 6081.

Books and Music bought at your home.

Specialist in Secondhand School and College Books.

Secondhand Music.

264 CHAPEL STREET,

— PRAHRAN —

(Opposite Town Hall).

Libraries Valued.

Full Stock of Esperanto Books.

Agent for "LA SUDA KRUCO."

aldonis:

—Ke oni mortpafu nun tiun homon.

Mirego sekvis la aklamon.

Tiam meze tomba silento, la maljunulo laŭtigis sian voĉon. Li diris:

—Malzorgo danĝerigis tiun ŝipon. En tiu ĉi momento ĝi estas eble perdita. Esti en la maro egalvaloras esti antaŭ la malamiko. Ŝipo, kiu faras traveturon, estas armeo kiu batalas. La ventego sin kaŝas, sed ne forestas. La tuta maro estas embusko. Mortkondamno por ĉiu manko farita en ĉeesto de la malamiko. Ne ekzistas kulpo pardoninda. Kuraĝon oni devas rekompenci kaj malzorgon oni devas puni.

Tiuj vortoj falis unu post alia, malrapide, grave, kun speco de malindulĝemo; kvazaŭ sur kverko frapoj de hakilo.

Kaj la maljunulo, rigardante la soldatojn, aldonis:

—Faru.

La homo, sur kies vesto brilis la kruco de Sankta Ludoviko, mallevis la kapon.

Je signo de grafo de Boisberthelot, du maristoj malsuprenis en la interferdekon, poste ili revenis kunportante la morttukon; la ŝippastro, kiu staris preĝante ĉe la kadro de oficioj, akompanis ambaŭ maristojn, serĝento deprenis el la batallinio dekdu soldatojn, kiujn li vicigis po ses laŭ du vicoj; la kanonisto, neniiginte dirante, sin metis inter ambaŭ. La pastro, krucifikso en mano, alpaŝis kaj sin lokis apud li.—Marŝu,—diris la serĝento. La malgranda patrolo direktis sin antaŭen laŭ malrapidaj paŝoj; ambaŭ maristoj, portante la morttukon, sekvis ilin.

Melankolia silento sur la korveto. Malproksima uragano blovis.

Post kelke da momentoj, pafado eksplodis en la malhelo, helaĵo pasis, poste ĉio silentis, kaj oni aŭdis la bruon de korpo falanta en la maron.

La maljuna pasaĝero ĉiam apogata al la granda masto, estis plektinta la brakojn, kaj revis.

Boisberthelot, montrante lin per fingro de sia maldekstra mano, mal-laŭte diris al La Vieuville:

La Vendee havas ĉefon.

El franca lingvo tradukis Marian Sola (El "Kataluna Esperantisto.")

FAMOUS ITALIAN STATESMAN ADMIREES ESPERANTO.

Every student of International politics and almost everyone who takes an interest in international affairs—and nowadays who is there who can afford not to do so—knows that Francesco Nitti, a former Premier of Italy, is an exceedingly far-seeing and sagacious man. He has had an intimate knowledge of European affairs during the past difficult ten years and is well qualified to write of them and of the lessons to be learnt from the terrible experiences of that period. His latest book, "Europe in the Abyss," deals with this theme, and enthusiastic with the prospect of the book being available to the whole world, he has given permission for it to be translated into Esperanto. He has written a special preface to the Esperanto edition in which he states that, though the book has been issued in many other languages, he is specially pleased that it is to appear in Esperanto, as he regards Esperanto as one of the greatest experiments in the history of culture, and if this book is able to spread the truth among all peoples he will be very glad that Esperanto was the powerful means of so doing. The Esperanto translation is by Robert Kreutz, consists of 200 pages and costs 3 goldmarks. The publishers are the Frankfurter Societats-druckerei, G. m. b. H., Frankfurt on Main, Germany. This is the first occasion on which a famous statesman has permitted a translation of his book into Esperanto and it behoves every Esperantist by purchasing a copy to show that the experiment was worthwhile, and so induce others to follow.

THE - CHOCOLATE - BOWL

18 Centreway

Collins Street, Melbourne

'Phone 2210

Best quality Chocolates, Nougats, Fudges, Marshmallows, Candies,
4, 5 and 6 oz., 1/-.

Fancy Boxes, 10/- upwards.

Aĉetu de Samidano!

A TRAVELLER'S TALE REFUTED

One sometimes hears the assertion from people who have travelled that they never have heard of Esperanto, nor have they seen any need of it. Two items recently received are worth recording.

Mr. F. R. Hamman, head of the modern language department in a High School in Milwaukee, writes:—"I am teaching myself this most modern of all languages at present; for I convinced myself of the usefulness, progress and great possibilities of Esperanto while travelling through Germany, Switzerland, France and Spain in 1922 and 1923 where I came in contact with many Esperantists. Before leaving Madrid I bought a Spanish-Esperanto Manual, which I began to study on my way back to America.

Miss Cora Gray, now teaching in New Haven, Conn., in writing of her travels says:—"You will be interested in one experience I had with Esperanto. Miss Coy and I were in Palestine where we met a young Persian from Teheran. He spoke Persian, French and Esperanto. Miss Coy did not, at the time, speak much French and he no English. They got along beautifully in Esperanto although he learned it in Persia and we had practically taught ourselves. The most entertaining thing to me was that though I knew comparatively little Esperanto, I could follow what was going on. This may be an old story to you, but it is my answer to the folks who want to know whether, if you learn it in one country, it will do any good at all in another.—"Amerika Esperantisto"

ANONCO.

S-ro M. J. Ravelick, G.P.O., Auckland, New Zealand, deziras korespondi per letero aŭ postkartoj kun ĉiuj landoj.

LETERO AL AMIKO EN EU'ROPO.

Estimata amiko,

Sajne mia lasta letero plaĉis al vi tiel mi denove penos interesi vin, tiu ĉi foje, pri la praarbaregoj de Aŭstralio, kaj la arboj kiuj troviĝas tie.

La praarbaroj de Aŭstralio etendiĝas sur 102,000,000 akreojn. La utileco de la plej gravaj lingvoj, estas diversaj kaj multnúmeraj, kaj pri beleco superas la lingvojn de ĉi ajn lando de la mondo, la plej belaj estas uzataj por la ornamarto kaj por konstrui meblojn. La karakterizaj ecoj de la Aŭstraliaj lingvoj estas la pezeco, kaj malmoleco, kelkaj specoj estas tiel pezaj, ke ili subakviĝas pro sia propra pezeco, kaj preskaŭ ĉiu speco estas tiel malmola, ke nur spertulo povas per martelo enbati najlon, kiam la lingvo sekiĝis kaj maturiĝis. La plej multe el la domoj en la antaŭurboj kaj kamparaj urboj, estas konstruitaj entute el lingvo.

La proksimeco de la praarbaroj al la ĉefurboj, donas al la naturamantoj oportunon, por ofte viziti kaj ĝui ĝiajn belecojn . . . unu horan veturado per vagonaro sufiĉas . . . kaj frue en aŭgusto . . . la lasta monato de nia vintro . . . kiam la plej belaj el niaj arboj la ora akacio floras, miloj da homoj vizitas la arbarojn por ĝui la belan spektaklon, pli ol 400 specoj de akacio troviĝas, kaj ili kreskas en ĉiuj el la ŝtatoj de la marbordo ĝis la preskaŭ dezerta lando en la centro de la kontinento, kaj troviĝas preskaŭ ĉie, eĉ en marĉoj kaj sur sekaj montflankoj; kelkaj el la specoj kreskas nur kelkajn colojn altajn, la plej multe estas arboj, sed kelkaj kreskas ĝis 100 aŭ 150 futojn altajn. La ŝelo de kelkaj el la specoj estas uzata por tani ledon, kaj krom tio, kio estas uzata en Aŭstralio, miloj da tunoj estas eksportataj.

La floro estas la neoficiala emblemo de Aŭstralio, kaj oni trovas

PHILLIP ISLAND

"Redcliffs," Newhaven.

The Ideal Tourist Resort.

6 hrs. from Melb. by boat and rail.

Accommodation for 50 Guests.

—First Class Table.—

Good Piano, Spacious Bathrooms, Croquet Lawn, Tennis Court, Good Boating, Fishing, Swimming and Shooting. Picnic Parties Arranged. Esperanto Spoken in the House.

E. S. BIGELOW, "Redcliffs," NEWHAVEN, PHILLIP ISLAND.

ĝin sur la nacia blazono, poŝtmandatoj, poŝtmarkoj, kaj tiel plu.

La eŭkaliptaj arboj estas la plej oftaj en niaj arbaregoj, kaj troviĝas 230 diversaj specoj, la ligno ankau estas diversa laŭ koloro, preskaŭ blanka, flava, bruna, kaj ruĝa, la arboj tre rapide kreskas, en dek jarojn la eŭkalipta arbo atingas la saman grandecon kaj altecon, por atingi kiun, la pino bezonas tri dek jarojn. En la parkoj la ĝardenistoj ofte dehakas ĉiujn el la branĉoj, apud la trunko, kaj pro tio la arbo plibeligiĝas, post nur kelkajn jarojn; la ŝelo de kelkaj el la specoj, kiam matura falas, kaj la nova ŝelo aperas preskaŭ blanka aŭ ĉielblua, kaj faras kontraston kontraŭ la preskaŭ nigra ŝelo de aliaj specoj.

La plej alta eŭkalipta arbo, laŭ oficiala mezuro troviĝas en Viktorio, kaj staras 326 futojn altajn, kun ĉirkaŭ mezuro 25½ futojn, mezuritan ses futoj alten de la tero; sed laŭ oni diroj troviĝas multaj eĉ pli grandaj en la arbaregoj de "Gippsland" la plej fruktdona parto de Viktorio.

Troviĝas en la arbaroj ankaŭ multe da filikoj, speciale rimarkindaj estas la arbfilikoj, kiuj kreskas en la ombro de la grandaj arboj en la montetvaloj, kaj kiuj ofte atingas la altecon de du dek futojn, kaj la folioj la longecon de dek futojn kaj aspektas, kvazaŭ grandaj belaj naturaj ombreloj.

Mi daŭrigos la temon en la proksima letero,

Via fidele P.H.

U.E.A. YEARBOOK.

This year's issue has several new features and the preparation of them has delayed completion of the book. News has, however, now come to hand from the central office that publication was expected to be made about the middle of June, so local members should soon receive their copies. Attention is directed to the fact that membership of the association with "Esperanto," from July to December, is only 8/6. Australia has been a solid supporter of the Universala Asocio and the ĉef-delgito makes a special appeal to those samideanoj who has hitherto omitted to join to send in their names to him as new members.

THE ZAMENHOF MONUMENT.

The secretary to the Committee has issued a further report which states that the contract has been arranged and that the sculptors are now at work on the monument in Aberdeen, Scotland. The material used is whitish grey granite, which has the reputation of being the most durable stone known. The monument when finished will weigh seven or eight tons. A list of contributions accompanies the report. Great Britain heads the list with £98/19/4, Australia coming next with £55/16/5, next in order being Holland £23/18/5, United States £20 4/2. Except Czechoslovakia, which contributed £10, every other country sent less than ten pounds. The report says "It is noteworthy that Great Britain (England, Scotland, Wales and Ireland) stands in the first rank. Then comes little Australia" Seeing that Australia is about 30 times the size of the British Isles and that the whole continent of Europe could be accommodated within Australia's borders without unduly stretching them, we can only assume that the "littleness" refers to the limited number of Esperantists in Australia compared with greater number of "samideanoj" in Great Britain.

UPTON SINCLAIR COMMENDS ESPERANTO.

A recent issue of the "Seattle Intelligencer" contained a special article by Upton Sinclair, the well-known American journalist and author, on the subject of International Language. In it he says "I venture to prophesy that it will not take three centuries, but only three decades for 9995 persons out of every ten thousand to be listening to the radio in Esperanto or some other language of that sort." He states that he has learned Esperanto and found it easy of acquirement and capable of fulfilling every demand made upon it. His conclusion is "Make up your mind which language (Esperanto or Ido), you care for. They are translating my books into Esperanto, so I am for that language."

KRONIKO.

Sidnejo, (N.S.W.)—Dum majo du propagandaj kunvenoj okazis . . . unu en la "Unitarian Church," kie Instruisto J. N. Edmonds parolis kaj la dua en Hurstville (Apud Sidnejo) sub la aŭspicioj de "Pleasant Sunday Afternoons Association." S-ro Dunleavy kaj gesinjoroj Taylor donis informojn ĉe la lastnomita asocio. Ambaŭ estis bone vizititaj kaj kuraŝantaj.

S-ro D. Calnan parolis al-la klubmembroj de la S.E.S. pri "Saneco," kaj S-ro F. V. Taylor lumbilde klarigis la belecon de niaj "Bluaj Montoj," precipe montrante la "Jenolan Caves," (kavernoj). Pli ol 70 lumbildoj estis uzitaj, kiujn la Registara Turista Oficejo pruntedonis.

Nova membro, S-ro S. Morrisse, sin prezentis. Li bone parolas Esperanton post studado el la "Esperanta Guide" de Maurice Hyde, dum nur kvar semajnoj.

"Wireless Weekly," loka ĵurnalo, kiu sin dediĉas al senfadena telegrafado, publikigis antaŭ kelkaj semajnoj tutpaŝan artikolon pri "Radio kaj Esperanto," kiu ŝajne vekis intereson inter senfadenaj interesusuloj. La Sidneja Esperanto-Societo jam ricevis kelkajn invitojn por paroladantoj, kaj la unua parolo okazis ĉe "Waverley Radio Club" je la 7 junio, kie s-ro F. T. Simon pritraktis la estantan kaj estontan kunlaboradon de ambaŭ modernaj komunikiloj-Esperanto kaj Radio.

Melburno, (V) — Jaŭdon vespere, je le 30 majo, ĉe la "Temperance Hall," Melburno, la anoj de la Raciista Grupo prezentis koncerton, kaj s-ro Pyke faris interesan paroladon pri Esperanto en Eŭropo, ilustrita per bildlanterno. S-ro Scurrie prezidis, kaj f-ino Adamson la energia sekretariino aranĝis la programon. Ĉeestis tre ŝatinda nombro da aŭskultantoj. Entute la programo estis tre ĝuebla; pro tio ni danku la gekantistojn, la parolantojn, kaj

ĉiujn el la samideanoj kiuj sindone helpis. Kolektiĝis du funtojn kaj ses ŝilingojn, por plibonigi la kason de la venonta kongreso Esperanta.

Rezulte de la iniciativo de s-ro Ballard, U.E.A. delegite, la Melbourne Broadcasting Station 3AR, (Melburna stacio brodkasta) donis Esperantan programon la 30an de junio. S-ro Rawson mallonge pri-skribis Esperanton, kaj montris, ke ĉi kaj Radio povus helpi unu la alian. S-roj Davidson kaj Hussey poste kantis. Raportoj ricevitaj montras, ke la koncerto aŭdiĝis rimarkinde klare en ĉiuj eksterurbaj distriktoj de Melburno kaj tre vekis intereson inter ne-Esperantistoj.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ĝis la 28 junio ni ricevis la jenajn sumojn: Coles Book Arcade, 15/-; J. J. Lalor, 4/6, aprilo '25; B. K. Blyth, 4/6, junio '25; W. E. Hill, 4/6, junio '25; J. Girdwood, 4/6, junio '25; V. Newnham, 4/6, aprilo '25; A. D. Milne, 1/-; W. G. Williams, 4/6, aprilo '25; T. H. W. Goessling, 4/9, majo '25; G. Williamson, 5/-, decembro '25; T. H. Cameron, 4/6, majo '25; C. C. Dornbusch, 5/-, junio '25; W. D. Smith, 5/-, junio '25; G. Houston, 4/6, majo '25; L. O'Connor, 4/6, junio '25; K. Simmons, 4/6, junio '25; C. Caine, 4/6, junio '25; H. M. Leighton, 4/6, junio '25; F. T. Cherret, 4/6, junio '25; H. S. Rienits, 4/6, majo '25; L. Pfahl, 5/-, junio '25; O. Behncken, 4/6, marto '25; L. W. Saw, 20/-, julio '25; McNaught and Johnson, 5/-, februaro '25; R. Nielsen, 4/6, junio '25; E. A. Sinnotte, 4/6, junio '25; L. Bagot, 4/6, majo '25; R. Rawson, 9/-, junio '25; M. E. L. Watkin, 4/6, majo '25; T. Balicek, 5/-, aŭgusto '25; D. Guilbert, 4/6, junio '25; E. F. Heritage, 4/6, junio '25; W. T. Middleborough, 4/6, junio '25; H. Hansen, 10/-, junio '25; D. B. Thomson, 4/6, februaro '25; A. Madarasz, 4/6, julio '25; F. T. Simon, 9/6, junio '25; N. Gaye, 5/-, junio '25; kontantaj, 9/4.

B.E.S.—ADRESARO

5th Edition now to hand, 1/-.

6th Edition: Register your name among the Esperantists of the world.
Price, 1/-.

Australian Agent: A. R. Cohen,
224 Barker's Road, Glenferrie, Melbourne.

VITAMIN.

Nature's remedy for physical and nervous exhaustion and disorders. . .

See testimonials.

For Children and adults.

Price per packet: 3/8 posted.

Australian Agent: A. R. Cohen,
224 Barker's Road, Glenferrie, Mel-

S. O. S.

Many copies of the "Suda Kruco" are sent to readers who have let their subscription run out. Are you one of them? If so, send your subscription along. The journal has battled along for four years and is worth preserving. Three hundred subscribers who keep their subscription paid up to date would insure the continuation of the journal. May we see by our post bag during the next week that the Esperantists of Australia intend to keep the "Suda Kruco" in existence.

GRUPOJ FILIIĜITAJ AL A.E.A. (Prezidanto: sinjoro W. H. King, Wellington, Nov-Zelando.)

Sydney: Esperanto-Societo. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.30—10 p.m. ĉe "Station House," Rawson Place (6a etaĝo). Guste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro. F. V. Taylor; sekretario, S-ro. L. E. Fosto, adreso. "The Brighton," Croydon Park, Sydney.

Melburna Sekcio de A.E.A.: Vicprezidanto, S-ro H. Byatt; sekretario, S-ro P. T. B. Hudson. Poŝta adreso, Box 731, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunveneĵo: Hardware Chambers, 350 Little Collins-str.; vendrede vespere, je la oka horo.

A.N.A.- Grupo, Oakleigh. Prezidanto: sinjoro W. Quinlivan; sekretario, sinjoro D. Thomson, poŝta adreso: ĉe British Imperial Oil Ko., 153 William-str., Melbourne. Kunveneĵo: Mechanics' Institute, Oakleigh, lunde vespere je la oka horo.

Berwick: Esperanta Grupo. Kunveneĵo kaj poŝta adreso: ĉe F-ino P. Abbott, "Chelsworth," Normanby Rd., Berwick, merkredo je 3.30 p.m.

Dargaville: Esperanto Societo. Prezidanto, S-ro Alfred Gregory. Sekretario, S-ro R. Pope. Poŝta adreso, P.O.; Dargaville, N.Z. Kun-

veneĵo: la legosalono de S-ro A. Gregory, vendrede vespere, je la sepa.

"Iru Antaŭen"-Grupo. Prezidantino: S-ino E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal Rd., Oakleigh. Kunveneĵo: 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere, je la oka horo.

vespere, je la oka horo.

"Malvern Girls' Club"-Grupo. Prezidantino: fraŭlino N. L. Byatt. Sekretariino: fraŭlino A. Midsley. Kunveneĵo kaj poŝta adreso: 117 Glenferrie-Road, Malvern, marde je la oka horo.

"Nigra Cigno"-Grupo. Prezidanto S-ro E. J. Goody, Sekretariino F-ino F. Cherratt. Poŝta adreso, 46 Leonard str., Victoria Park, W.A. Kunveneĵoj vespere je la oka horo, "Perth Academy," komencantoj merkredo; progresintoj, 9 Pier-str: ĵaŭde.

Persista Grupo, Armadale, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt, Sekretariino: F-ino I. Thomas, Kunveneĵo kaj poŝta adreso, 62 Northcote Rd., Armadale, merkredo vespere, je la oka horo.

Whangarei Grupo Esperanta. Prezidanto, S-ro D. Tilly. Sekretario, S-ro Chas. Waymouth. Poŝta adreso, ĉe S-ro Chas. Waymouth, strato Manse, Whangarei, N.Z. Kunveneĵo: La domo de S-ro Tilly, strato Water, Whangarei, vendrede, je la oka horo vespere.

Raciista Esperanta kaj Diskuta Grupo. Prezidanto, sinjoro J. Skurrie: sekretariino, fraŭlino B. Adamson. Poŝta adreso, 673 Canning-str., North Carlton, Melbourne. Kunveneĵo, Temperance Hall, Russell-str., Melbourne, ĵaŭde je la sepa horo.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunveneĵo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str.; Hobart.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.